


**Grupo Esperantista de Bilbao**
Barrencalle Barrena, 7-1ª deks.
48005-BILBAO (Hispanujo)
✍ *Redaktas:*
Jesús-Miguel García Iturrioz

**Kunven-tago:**
Vendredo (19:30-21:00 h.)
☎ 619.694.683 (Iciar)
☎ 658.709.087 (Jesús)
💻 esperantobi@gmail.com

(La E-Grupo de Bilbao estis fondita la 20an de majo de 1906)
TTT-ejo: https://sites.google.com/site/esperantobi/home
En Fejsbuko, serĉu "esperanto grupo bilbao"

**Jar-kotizoj**: Normala: **60 €.** ● Familia: **70 €.** ● Juna (ĝis 30 jaroj): **20 €.**
**KUTXABANK-konto** (IBAN-kodo): **ES44-2095-0023-5122-1800-1550**

**JANUARO-MARTO 2025** **Nro. 142 (1/25)**




*Ni rigardis malantaŭen kaj trovis tiun-ĉi propagandafiŝon pri E-kurso en nia sidejo. Bedaŭrinde, ĉi-jare ne eblis organizi la kutiman elementan kurson, sed ne forgesu, ke ni daŭrigas la kunvenojn ĉiuvendrede, je la 19:30 h., por kune perfektigi nian fluecon rilate E-parolon.*

*No olvidéis que, aunque este año no ha sido posible organizar el habitual "elementa kurso", continuamos reuniéndonos los viernes, a las 19:30 h. para conversar en Esperanto y, así, mejorar nuestra fluidez al hablar. Os esperamos. No hace falta poseer un determinado nivel.*

**LOKE**

# NEKROLOGOJ.

Ni ne bone finis la jaron 2024an kaj ankaŭ malbone komencis la jaron 2025an. Ĉar devis adiaŭi du tre koramikajn membrojn de nia asocio. Kaj ili ambaŭ ankoraŭ sufiĉe junaj por forpasi.



La 12an de decembro 2024a forpasis **Txabi Gandiaga Asumendi**.

Li travivis du periodojn rilate Esperanton: La unuan, je la 80aj jaroj de la pasinta jarcento, kiam aktive partoprenis niajn agadojn kaj regule vizitis nian sidejon.

En la jaro 1981, li veturis, kune kun aliaj gejunuloj de nia rondo, al Bjalistoko por partopreni E-laborbrigadon kaj ankaŭ kunlaboris en la kongreseto, kiun oni organizis tiam por celebri la 75an datrevenon de la E-Grupo de Bilbao.



Poste, pro laboro kaj aliaj cirkonstancoj, li malaperis sed denove revenis en la jaro 2013 kaj partoprenis diversajn E-kursojn.

Je la lastaj jaroj, li suferis diversajn malsanojn kaj operaciojn, sed neniam perdis optimismon kaj rideton sur sia vizaĝo ... ĝis lia neatendita morto.



Kaj la 18an de januaro 2025 forpasis **Iñigo Velasco Dañobeitia**.

Li estis preskaŭ novbakita esperantisto ĉar aperis en nia Grupo komence de la jaro 2018 por partopreni E-kurson. Iom poste ni suferis pandemion kaj, sekve, ne estis multaj okazoj por renkontiĝi.

Sed tio ne estis obstaklo por li postlasu neforgeseblajn spurojn. Ĉiam kun tiu rideto, kiun ni povas vidi sur la apuda foto kaj ĉiam preta helpi aliajn.

Dum la lastaj jaroj, tiu terura malsano hispane nomita ELA (Amiotrofa lateralsklerozo, en Esperanto) kaptis lin. Iom post iom li iĝis pli kaj pli malsana. Lastfoje li vizitis nian sidejon okaze de la Z-festo, en decembro 2023, kiam estas jam ege videbla la malsano.




Unu el la nevoj de Iñigo gravuris, en Esperanto, la ĉisupran etan omaĝon al Iñigo sur la planko de rulejo en Algorta, lia loĝloko. Estis skribite “Memore al Iñigo Belasko”.

**LOKE**

## Ni ne sukcesis en la Kristnaska loterio 2024.


Esperanto-Grupo
www.esperanto.net
Barrencalle Barrena, 7 - 1.º • Tfno. 658 70 90 87
48005 BILBAO
Nacia Loterio N.º 79.564
La posedanto de tiu ĉi kvitanco partoprenas, per kvar (4,00) eŭroj, la numeron kies lotado okazos en Madrido la 22-an de Decembro 2024.
0001
4,00 eŭroj
(MON-DONACO: + 1,00 €
En caso de premio, este número estará sometido a los gravámenes que establece la legislación tributaria vigente.
Senvalora post 3 monatoj. Caduca a los 3 meses. 3 hilabeteren ondoren, baliorik gabea
Imprenta MENA - Portugalete

Kun bedaŭro, unu jaron plian ni devas ripeti ke **favora sorto ne trafis nin** en la nacia hispana lotado de Kristnasko.

Almenaŭ (kaj feliĉe), **ni sukcesis vendi ĉiujn biletojn**.

Tutkore ni dankas la laboron de ĉiuj, kiuj helpis en la disvendado, kun speciala mencio al tiuj geesperantistoj, kiuj loĝantaj ekster nia urbo, aĉetis niajn E-kvitancojn pere de interreto .... Ĝis la venonta jaro.

## Z-festotago.

Kiel anoncite, la sabaton 14an de decembro ni kunvenis en la sidejo de la Grupo



por kunmemori la naskiĝtagon de ludoviko Zamenhof. Ni kune manĝis kelkajn frandaĵojn, aŭskultis muzikon, kiun piane ludis Susana Zabaco, ĥore kantis La Esperon kaj ĝuis agrablan etoson kaj interparoladojnkun amikoj Ĉi jare vizitis nin du ekster



landanoj, unu el Japanio kaj alia el Kroatio.

Sur la dekstra foto, esperanta omleto alportita de entuziasma esperantistino..

## Nia sociaro.

Dum la jaro 2024, aliĝis 2 homoj kaj eksis 1 homo (mortis).
Sekve je la fino de 2024, la E-Grupo de Bilbao havis **58 anojn**.

## Subvencio ricevita de "Fundación Esperanto".

Fine de 2024 nia Grupo ricevis 2.000 € kiel subvencio "pro organizado de kursoj kaj eksterordinaraj elspezoj de la komunumo de proprietuloj rilate al la fizika sidejo".

Ĉi jare eblis disdoni pli da mono ol kutime inter la diversaj E-rondojn de Hispanio danke al sindonemo de anonima bonfarulo kaj al la alta profito de la diversaj investoj de la Fondaĵo.

## Hispana Kongreso en Soria.



Hispana Kongreso disvolviĝos inter la 1a kaj la 4a de majo 2025 en unu el la plej malgrandaj provincaj ĉefurboj de Hispanio: Soria. Ĝi estas la dua plej malgranda post Teruel.





Soria troviĝas pli-malpli en la centro de la iberia duoninsulo. Ĝi havas nuntempe ĉirkaŭ 40.000 enloĝantojn. Tamen, troviĝas en regiono kun vere riĉa historio jam de antaŭ la alveno de romianoj al Iberio.

Ĉiuj detaloj pri la kongreso (aliĝilo, programo, ekskursoj, aliĝintoj, ...) vi trovos en https://kongreso.esperanto.es/

Je la fino de februaro estis jam 122 aliĝintoj.

## Scienca lerneja kalendaro denove en Esperanto en 2025.




Kiel ĉiun jaron ekde 2022, denove en 2025 ni disponos je versio en Esperanto de la Scienca Lerneja Kalendaro de la Supera Konsilio por Scienca Esplorado de Hispanio (CSIC). Ĝi prezentas ĉiutagajn datrevenojn de sciencaj eventoj aŭ de sciencistoj, kun speciala atento al la diverseco. Ĝi estas publikigata en 11 lingvoj, kaj havas ankaŭ versiojn en facila lingvaĵo (ankaŭ en Esperanto), plus proponojn por utiligado en lernejoj aŭ por infanoj.

Vi povas ĝin aliri kaj elŝuti en la adreso https://digital.csic.es/handle/10261/374870. Pri la traduko zorgis skipo kunordigita de la Hispana Esperanto-Federacio.

Ankaŭ troviĝas tie versio en *ical*-formato por aldoni al propra kalendaro, kaj vi povas ĉiutage sekvi ĉiujn datrevenojn ĉe Twitter: https://x.com/SciKalendaro.

*(La Bitbulteno de HEF. Nro. 98. Jan. 2025)*

## Svarmas E-aktivaĵoj en Segovia.




La pasintan jaron 2024an ekis “Asociación Segoviana de Esperanto”, kies sidejo troviĝas en la bela urbo La Granja de San Ildefonso. Do, preskaŭ ĵus naskiĝinta bebo sed ege aktiva: ekspozicio “Esperanto: de utopía a realidad”, okazigo de kurso de Esperanto kaj prezentado de ambaŭ eventoj en loka televidkanalo “La 8 Segovia”, kun ege interesa intervjuo al David Trigo (Prezidanto) kaj Laura Esteban (Sekretariino). Eblas ĝin spekti ĉe https://youtu.be/sd3LXjQ0yhU?t=148.

**HEF**

## E-Renkontiĝo en Kanariaj Insuloj.

La 1-an de februaro okazis la unua tutkanaria kunveno de esperantistoj, kiuj grupigos samideanojn de Tenerifo kaj Granda Kanario.

La Kanariaj Insuloj konsistas el ok loĝataj insuloj. Tial, persona konatiĝo inter homoj de malsamaj insuloj ne estas ofta.

Grupeto de esperantistoj el la insulo Tenerifo kaj alia loĝanta sur la insulo La Palma vizitis la ĉefurbon de la najbara insulo Gran Canaria, Las Palmas, por renkontiĝi kun lokaj Esperanto-parolantoj.

*(La Bitbulteno de HEF. Nro. 98. Jan. 2025)*


## Junulara renkontiĝo en Olot (Girona).

La Kataluna Esperanto-Junularo okazigis junularan Esperanto-aranĝon, de la 20a ĝis la 23a de februaro 2025 en Olot (Girona), konkrete en la gastejo Alberg Olot Xanascat.

“RenKEJtiĝo” estas la oficiala plurtaga aranĝo de la Kataluna Esperanto-Junularo (KEJ), por junaj esperantistoj kaj de Katalunio kaj de ĉie. La nomo estas vortludo kun la Esperanta vorto “renkontiĝo” kaj KEJ, la mallongigo de la asocio.

*(La Bitbulteno de HEF. Nro. 98. Jan. 2025)*

## Eldono de novaj “ĉemizoj” por la “Kiĥotoj”.




HEF eldonigis 350 novajn “ĉemizojn” por kovri la librojn “La inĝenia hidalgo Don Kiĥoto de la Manĉo”.


La antaŭaj estis difektitaj de la tempopaso kaj tio okazigis malbelan aspekton de la libroj.

Parto de la “ĉemizoj” estis sendita al la diversaj hispanaj lokaj grupoj, sed la plejparto estos disponebla por la nacia kongreso en Soria, kie eblos aĉeti ilin je ege modesta prezo ĉe la kutima libroservo.

Atentu, ke al nia E-Grupo de Bilbao ankaŭ alvenis tiujn ĉemizojn, do ili disponeblas por eventualaj interesintoj.

## Kompanio uzas Eon.



ÍNDICE

1. Quiénes somos 7
2. Ventanas de PVC 15
2.1. NOKTO 17
2.2. KIOM 23
2.3. IZOLA 29
2.4. SUNON 37
2.5. DUOP 43
2.6. LUKSA 49
3. Puertas de entrada 57
4. Complementos 61
4.1. Persianas 63
4.2. Mosquiteras 67

“Hermet 10” estas hispana kompanio, kiu produktas fenestrojn. Min tre surprizis trovaĵo, kiun mi faris dum mi konsultas ilian katalogon por mia apartamento. La fenestromodeloj de “Hermet 10” havas nomojn en Esperanto. Vidu la pruvon en la apudaj fotoj: "nokto", "kiom", "izola", "sunon", "duop'", "luksa". Tutevidente, ne temas pri koincido

*(El vacapa kanalo “Esperanto”. 15/02/2025)*

## TRA LA MONDO …

# Forpasis RENATO CORSETTI (1941-2025), Honora Prezidanto de UEA

UEA profunde bedaŭras informi, ke forpasis D-ro Renato Corsetti (naskiĝis la 29-an de marto 1941) la 1-an de februaro 2025, en la aĝo de 83 jaroj, en Londono. Eksa prezidanto de UEA (2001-2007) kaj honora prezidanto de UEA kaj TEJO, li estis multfaka kaj energia kunlaboranto kaj unu el la plej eminentaj figuroj en la esperantista movado, kaj en la itala kaj en la internacia, ekde siaj junaj ĝis siaj lastaj jaroj.




Naskiĝinta en Romo, li komencis sian profesian karieron en banko. Li ekaktivis en la Esperanto-movado fine de la 1960-aj jaroj kaj baldaŭ poste iĝis Prezidanto de TEJO (1971-1973). La Estraron de UEA li unue eniris en 1980 kaj oficis ĝis 1986; denove en 1998 kiel Vicprezidanto kaj en 2001 kiel Prezidanto de UEA.

Dum sia longa kariero en UEA li aktivis en multaj komisionoj kaj kunlaboris en multaj projektoj kun aktivuloj tra la mondo, ekzemple en la Instituto Hodler '68, kie li estis Prezidanto (1980-1986) kaj Vicprezidanto (ekde 2002). En 2011, rekonante lian longdaŭran agadon por la Asocio, la Komitato de UEA deklaris lin Honora Membro kaj en 2023 nomumis lin Honora Prezidanto okaze de la 108-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Torino. Li ankaŭ ricevis la Premion Deguĉi en 2008. Krom siaj honoraj titoloj kaj premioj en UEA li ankaŭ estis Honora Prezidanto de TEJO.

En la pasintaj kelkaj jaroj li aktive kunlaboris por informa agado de UEA, kunordigante projektojn pri disvastigado de afiŝoj rilate al lingva justeco kaj okaze de la Esperanto-Tago kaj la Tago de la Gepatra Lingvo. Krome lia agado ne limiĝis en UEA kaj TEJO: li ankaŭ estis estrarano kaj prezidanto de Itala Esperanto-Federacio dum pluraj periodoj. Li estis elektita kiel membro de la Akademio de Esperanto en 1998.

Li estis lingvisto kaj profesoro, ofte prelegante aŭ verkante en Esperanto kaj en la itala pri lingva politiko, Esperanto, infana dulingveco, psikopedagogio de lingvo kaj komunikado. Li aŭtoris multajn artikolojn kaj librojn. Li instruis psikolingvistikon en la Universitato "La Sapienza" de Romo en la 1990-aj jaroj kaj estis profesoro de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) en San-Marino.


UEA perdis ne nur eksan prezidanton, sed ankaŭ gravan kunlaboranton, amikon kaj unu el la plej gravaj motoroj en la moderna historio de la Asocio. UEA esprimas siajn profundajn kondolencojn al la tuta familio, ĉefe al lia edzino **Anna Löwenstein**, mem honora membro de UEA kaj eminenta Esperanto-instruisto, kaj al liaj tri filoj.

*(Gazetaraj Komunikoj de UEA. N-ro 1212. 01/02/2025)*

**Sur la foto, Renato alparolas la ĉeestantojn al ĝenerala kunveno de HEF dum EEU-kongreso okazinta en Bilbao en 2004**.

**TRA LA MONDO …**

## RENOVIGATA LA RETEJO “ESPERANTO EN 12 LECIONOJ”.




La retejo “Esperanto en 12 Lecionoj” – **https://esperanto12.net** – proponas kurson por lerni la Internacian Lingvon surbaze de la zagreba metodo. Ĝi estas konsiderata “la plej rapida kurso” por lerni la bazojn de Esperanto, konsistanta el 12 lecionoj, ĉiu kun tekstoj, gramatikaj klarigoj kaj 3 ekzercoj. La aŭtoroj de la zagreba metodo estas Zlatko Tišljar, Spomenka Štimec, Ivica Špoljarec kaj Roger Imbert, kun kiuj stile kunlaboris Tibor Sekelj.

Per la kurso “Esperanto en 12 Lecionoj” lernantoj konatiĝas kun la 500 plej gravaj vortoj de nia lingvo kaj, fininte la kurson, ili povas kompreni la plej gravajn trajtojn de Esperanto kaj formi frazojn por esprimi sin laŭ baza nivelo. Neniu registriĝo necesas. Sufiĉas enklaki kaj komenci.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA. N-ro 1202. 16/12/2024)

## La estraro de TEJO eksigis la prezidanton.

La estraranoj de TEJO plenumis sian ribelon kontraŭ la prezidanto kaj eksigis lin. Anstataŭ atendi voĉdonadon de la komitato, la estraro decidis reasigni la rolon de prezidanto al Lucía Fernández Barrera. La ĝisnuna prezidanto Matúšov restas en la estraro, almenaŭ por nun. Estis komuna letero de 4 estraranoj petante la eksigon de Matúšov pro lia “malĝentila” kaj “malrespektema” agado.

*(El “Libera Folio”. 11/02/2025)*


## Ses esperantistoj batalas por Ukrainio.

Almenaŭ ses esperantistoj nun batalas por defendi Ukrainion kontraŭ la agreso de Rusio. Unu alia pereis. Ne estas permesite malkaŝi detalojn pri ili, sed dum la IJK oni kolektis monon por helpi al ili kaj iliaj familioj.

*(El “Libera Folio”. 11/02/2025)*

**TRA LA MONDO …**

## Esperanto kaj Artefarita Intelekto (AI).




Lastatempe, preskaŭ ĉiutage en la amaskomunikiloj, oni parolas pri Artefarita Intelekto (AI), despli kiam aperis en januaro 2025 la ĉina "DeepSeek" (traduko povas esti "Profundiganta serĉado").

Du HEF-anoj provis tiun apon en rilato al Esperanto kaj informis pri la rezultoj. Unu el ili demandis: "Mi devas prelegi publike pri Esperanto, kaj mi ŝatus scii kiujn temojn mi devus elstarigi por homoj kiuj interesiĝas pri la lingvo Esperanto sed ne multe scias pri ĝi".
Jen la respondo (kompreneble, tute en Esperanto):

"Ho, kiom mojosa projekto! Jen kelkaj temoj, kiujn vi povus elstarigi:
1. Kio estas Esperanto?
 - Simpla klarigo: E-o estas planlingvo kreita por faciligi internacian komunikadon.
 - Historio: Menciu, ke ĝi estis kreita de L.L. Zamenhof en 1887 kaj havas la celon esti neŭtrala kaj facila por ĉiuj.
 - Celo: Emfazu, ke ĝi ne celas anstataŭi aliajn lingvojn, sed esti komuna dua lingvo por ĉiuj.
2. Kial lerni Esperanton?
 - Facileco: Gramatiko simpla kaj regula, sen esceptoj.
 -Neŭtraleco: Ĝi ne apartenas al iu specifa nacio aŭ kulturo.
 - Komunumo: Tutmonda komunumo de parolantoj, kun renkontiĝoj, eventoj kaj retaj forumoj.
 - Kultura riĉeco: Menciu pri Esperanto-literaturo, muziko, kaj eĉ filmoj.
3. Kiel funkcias Esperanto?
 - Gramatiko: Ekzemploj de la 16 fundamentaj reguloj (ekz., neniu esceptoj, regulaj verboj).
 - Vortfarado: Montru kiel oni povas krei novajn vortojn per afiksoj (ekz., mal-, -eto).
 - Elparolo: Klara kaj simpla elparolo, ĉiu litero havas unu sonon.
4. Kie oni povas uzi Esperanton?
 - Eventoj: Mondaj kongresoj, lokaj renkontiĝoj, kaj Pasporta Servo.
 - Interreto: Forumoj, retaj kursoj, kaj sociaj retejoj por Esperantistoj.
 - Vojaĝado: Esperanto kiel ilo por renkonti homojn tra la mondo.
5. Mitoj kaj miskomprenoj pri Esperanto.
 - Ĝi estas tro malgranda por esti utila. (Fakte, ĝi havas vivan kaj aktivulan komunumon.)
 - Ĝi estas nur por idealistoj. (Fakte, homoj lernas ĝin por diversaj kialoj, inkluzive praktikaj.)
 - Ĝi ne havas kulturon. (Fakte, ekzistas riĉa literaturo, muziko, kaj eĉ originalaj filmoj en Esperanto.)

**Ktp, ktp, ... daŭrigas ĝis 10 ideoj por la prelego pri Esperanto ... Nekredeble, ĉu?**